

INTERNACIA SOCIA REVUO

MONATA ESPERANTA GAZETO, INTERNACIE REDAKTATA PER ĈIO,
KIO INTERESAS LA HOMARAN VIVADON.

Sendu ĉion, kio rilatas al la

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO

al J. L. BRUIJN, Weimarstraat 225, Hago (Nederlando)
(Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista, London)

ABONPREZO:

(Universala Poŝta Unuiĝo)

Jare: 1,40 Sm.; duonjare: 0,80 Sm.

Helpabono: Jare almenaŭ 4 Sm.

ENHAVO: Divido, p. 61; La armigado de la grandaj nacioj kaj la laboristaro, p. 61; La ligo internacia por la racia edukado de l' infanaro, p. 62; Al sinjoro Joseph Eydemanth, p. 62.

Socia Movado: Franclando, p. 62; Germanujo, p. 63; Hungarujo, p. 64; Nov-Zelando, p. 64; Rumanujo, p. 65; Ruslando, p. 66; Svedlando, p. 66.

Esperanta Movado: Ruslando, p. 67; Hispanujo, p. 67. Alvoko kaj Peto, p. 67; Novajoj Ĉiulandaj, p. 68; Novaj Revuoj, p. 68; Leterkesto, p. 68; Niaj Kalkuloj, p. 68.

Nun antaŭen! kun sentoj kaj pensoj
La dividon lastan ni dividu;
Por plenumi vorton promesitan —
Al la mort', frato, al la mort' ni iru!

Tradukis el bulgara lingvo:

IV. H. KRESTANOF,

en *Pleven* (Bulgario).

Atentu nian novan adreson.

Divido.

de HRISTO BOTEV.¹⁾

(kantebla laŭ la sama bulgara melodio).

Egalsentaj estas homfratoj
Kaj pensojn egalajn ni ja kaŝas
Kaj, kedu ke por neni' en mondo
Ni ja iam al pento alpaŝos.

Bonon aŭ malbonon ĉu ni faris
Nin juĝos ja la posteularo;
Kaj nun — donu la manon en mano
Kaj antaŭen kun pli fort' paŝaro!

Kuniranto estis en la vivo
La suferoj, malriĉec' en fremdland',
Sed ni frate ilin dividadis
Kaj ripetos tion je ĉiu rand'....

Dividos ni homajn la riproĉojn,
Toleros ni sovaĝajn la mokojn,
Toleros, sed ĝemos ni neniam,
Sub kiajn ajn homarajn sufokojn.

Kaj la kapon neniam mallevos
Antaŭ mondidoĵoj kaj pasioj:
Nian koron ni jam komunikis
Per bedaŭroj la du niaj arpoj....

La armigado de la grandaj nacioj kaj la laboristaro.

Ĉiutage ni legas en la gazetaro, ke ĉiuj grandaj nacioj freneze armigis sin. Antaŭeniras Granda Britujo per konstruado de militsipegoj (Dreadnought); ĝin sekvas Germanujo kaj la aliaj landoj. Aŭstrujo-Hungarujo pli-grandigas sian ter-armeon. La malgrandaj landoj ankaŭ imitas la grandajn, unuvorte, en la tuta mondo febre daŭras la armigado. Kion signifas tio? Frue aŭ malfrue militon. Kvankam ili diras — kaj tio estas la plej hontiga en la afero — ke ĉio tio ĉi okazas por la „paco“; ke ili per tio ĉi intencas defendi la pacon. Ho, malfeliĉa paco! Vi estas simila al iama ŝafido, kiun gardis lupoj, kaj spite tamen pereis.

Kaj tiun multegan monon por armeo kaj armiloj, entute ni, laboristoj devas krei. La peraj impostoj preskaŭ en ĉiuj landoj estas tiel altaj, ke la laboristo ofte pagas pli da imposto por ia ajn objekto ol ĝi valoras.

Sed, se la mastroj mem pagus ĉiujn impostojn, ni ne povus eĉ tiam diri, ke ili pagas: ĉar renton, profiton nur la laboristoj produktas! Do, kiam la mastroj pagas imposton, fakte estas la laboristo kiu pagas.

En multe da landoj la tuberkulozo, ĥolero, tifuso k.t.p. pereigas la popolon, precipe la laboristaron, ĉar ĝia malbone nutrita organismo ne povas kontraŭstari la epidemion. Aliparte ĝi estas tre malklera kaj ne scias sin ŝirmi kontraŭ malsaneco. Malgraŭ ĉio tio ĉi la potenculoj tute ne zorgas pri la bonvivado kaj instruado de l' popolo. Male! Kial havus la popolo scion kaj

¹⁾ Hristo Botev estas bone konata bulgara poeto-revolucionisto, naskita en Kalofer 1847 jaro kaj mortigita apud Vratza dum batalo kun Turkoj en 1866 jaro.

kulturon? Tiam ĝi elirus el sia longa letargia sonĝo kaj forpelus siajn tiranojn. Tiel pensadas la potenculoj.

Ĉiu eipensajo — unuavice — apartenas al armeo, kiel nuntempe la aerŝipo. Se oni konstruas fervojon neniam oni rigardas la profiton de l' popolo, sed nur la strategion (militarton). Por la scienco ili oferas al ĝi nenion. Ja, scienco kaj armeo estas du malsamaj aferoj. Kie oni renkontas armeon, tie ne povas ekzisti vera kulturo sed nur barbara kulturo, kiel estas la nuna epoko, en kiu la homoj trompas, ŝtelas kaj mortigas unu la alian pro profito, mizero kaj malsaĝeco. Tiuj, kiuj pensas, ke baldaŭ finiĝos la armigado de l' nacioj, eraras: ĉar ili daŭrigos tiun ĉi mortigan politikon, ĝis kiam la laboristaro ilin ekmalhelpos en iliaj frenezecoj. En tiu ĉi gravega laboro revoluciemajn laboristojn koncernas la temo: malakceli la armeon kaj malhelpi ĝian armigadon. Ni, ne tre povas fidi socialdemokratanojn, nek iliajn komitatojn, ĉar la laste nomitaj multe pli bone timas sian mandaton, kvazaŭ obstrukcius ĝin en la parlamento. Aliparte ili bezonas armeon, ĉar ili celadas publikajn povojn. Kaj laŭ mia opinio aŭtoritato neniam povas stari sen armeo.

Kaj, por ke ni, kiel eble plej sukcese povu plenumi nian rolon, ni devas instrui kaj klarigi laboristaron: ke ĝia mizereco ne devenas el dio, sed ĝin kaŭzas la grandsinjoroj, kiuj la popolon vole tenas en malklereco, por ke ĝin pli facile povu trompi kaj esploti. Ni devas konvinki la laboristojn por eviti — kiel eble plej bone — ĉiun laborejon kie oni pretigas armilojn, ĉar per tio ili fosas siajn tombojn. Nur tiam ni sukcesos ŝanĝigi la nunan socian sistemon, se la popolo fariĝos inteligenta, ke ĝin neniu povu trompi kaj delogi, alie ne. Eble kiam la mizereco estos granda, la popolo ekribelos, sed tio ne ekŝanĝigos la socion — sed nur kelkafoje la regantojn. Laboristoj pripensu tion!

SINCERA.

La Ligo Internacia por la racia edukado de l' Infanaro.

La malnovaj abonintoj de I. S. R. konas tiun ligon kaj legis en la numeroj 3a kaj 4a (1908) la principojn kaj statutojn.

Pro la aresto, kaj poste la asasino al FRANCISKO FERRER, kiuj sekvis la okazintaĵojn de Barcelono, la laboro de la ligo estis iom forlasita, ĉar la membroj penadis multe por savi nian kamaradon kaj post lia asasino okupis sin savi la bienojn, kiuj povus permesi daŭrigi la tutan projekton (lernejoj, ligo, ĵurnalo, k.t.p.) kiu necesigas multe da mono. Sed ĉar kiel ĉiuj aferoj juraj, tiu ĉi daŭros longatempe, la komitato decidis restarigi de nun la ligon, kiu estos la plej urĝa.

Insiste ni admonos nian tutan gelegantaron respondi favore je la alvoko de l' komitato aliĝante al la ligo, varbante anojn kaj fondante grupojn ĉiulande.

La jarkotizo estas laŭvole, sed 1.20 frankoj minimume, devas esti sendataj al kamarado A. BERTRAND, 41 Rue de Seine en Paris, kie estas la centra sidejo de la ligo.

I. S. R.

Al sinjoro Joseph Eydelnanth.

En via antaŭvorto de la raporto de Tolstoj al kongreso de Paco, mi legis la frazon sekvantan: „Oni povus ekzemple tute libere kaj sen malutilo por la Ideo, anstataŭigi la vorton tiel ofte uzatan en tiu ĉi raporto: la kristanismo per la alia malpli mistika: la homismo, la homaro”.

Mi deziras diri al vi ke, laŭ mi, tiu anstataŭigo estas ne dezirinda, ne logika. Kristanismo estas mistika kredo kun ĝia dia bazo. Kontraŭe homaro esprimas ne mistikan ideon, nomanta ion kiu ekzistas. Lasu al la kristano lian mistikan kredon bazitan sur amo je Dio, kies ekziston li ne povas pruvi. La liberpensulo amas siajn proksimulojn . . . sen Dio. Ne forgesu, ke kristano kaj liberpensulo, eĉ se ili estas ambaŭ kontraŭmilituloj, ne povas marŝi al la sama paca idealo: ĉar la unua ĉiam serĉos la veron, dum la dua kontentiĝos per fantazio, per nevereco, per la ekzisto de Dio. Ilia paca palaco ripozas sur malsama fundamento. Do, oni ne anstataŭigu la vorton kristanismo per homaro, kiu povas vivi feliĉe sen Kristo.

ELIZABETH HAMBURGER-CORDES.

Blaricum, Holando.

Socia Movado.

El Franclando.

Malgraŭ la penoj de la revoluciistoj, eminentuloj, ĵurnaloj el ĉiuj opinioj klopodintaj por eviti ke oni tranĉu la kapon de LIABEUF, tiu junulo, viktimo de la moroj-policistoj — pro kiu nia kamarado HERVÉ estas malliberigata por tempo de 4 jaroj — la respublika prezidanto lasis lin ekzekuti. Li tre certe estus pardoninta lin, t. e. ke la malfeliĉulo estus ekspedita en punlaborejon ĝis lia morto, se la polica prefekto ne promesis ekŝigi se LIABEUF ne estus ekzekutata. Se LIABEUF estus senkulpigita de la juĝantaro, estus la kondamno de la polico. Li mortigis nevole policiston kaj vundis du aliajn sin defendante. La polico do volis la mortpunon por li. Malgraŭ la malfrua horo je kiu oni sciis ke LIABEUF estus gilotinata, la „Guerre Sociale” disdonis specialan numeron en la vesperaj kunvenoj invitante ĉiujn revoluciistojn iri manifestacii antaŭ la malliberejo. Ĉirkaŭ *du miloj* ĉeestis. La policistoj estis grandnombre. La krioj: vivu LIABEUF! asasinistoj! asasinistoj! aŭdigis ĉiufanke. La ekatakoj multiĝas, la policistoj frapis sovaĝe la manifestantojn. Estis multe da vanditaj viroj kaj virinoj. Policisto ricevis revolveran kuglon en la gorĝo. LIABEUF, kies kuraĝo estis ĉiam rimarkinda, ne timis la morton, li neniam volis peti favoron nek pardonon, li nur havis ideon: „li deziris nur havi kelkajn minutojn antaŭ sia ekzekuto, por diri ke neniam li estis prostituisto”. Ankoraŭ fojon oni konstatis ke la polico estas pli forta ol la publika opinio.

* * *

Antaŭ kelkaj semajnoj okazis la enterigo de laboristo, mortinta pro la vundoj faritaj al li de policistoj en

konflikto kun strikantoj. La sindikatoj alvokis la kamaradojn, kiuj estis 10.000 post la ĉerkoveturilo kun ruĝaj standardoj. Ili laŭte malŝatis la policistojn, kiuj estis grandnombre. Tiuj lastaj silentis iom, sed ili intencis sin glorigi iom pli malfrue. Por la reveno en Paris 1) parto de la akompanintoj marŝis ope. Antaŭ la alveno al la pordoj de Paris, la policistoj kaj soldatoj estis amasiĝintaj tie. Unu el estroj ordonis al la manifestantoj disigi. Sed tiuj ĉi rifuzis. Tiam la batalo komencis. Kiel kutime estis multe da vunditoj, sed la policistoj havis ankaŭ multe da vunditoj.

La 4an de Julio okazis la granda proceso de la 16 membroj de l' Komitato de Defendo Socia. Ili estis subskribintaj afiŝon kontraŭbatalantan la militan punlaborejon nomitan „Biribi” kaj konigantan la nomojn de la asasinistoj de la soldato AERNOULT.

La proceso daŭris dum 2 tagoj. Krom la akuzitoj multe da atestantoj faris la historion de „Biribi” kaj priskribis la turmentegojn faritajn de la suboficiroj. La rezultato estis la senkulpigo unuanime por niaj 16 kamaradoj. Do estis la kondamno de „Biribi”. Afiŝoj estis poste algluataj konigantaj la verdikton kaj portantaj tiun frazon: „Biribi ĵus estas kondamnita de la juĝantaro; kion la registaro atendas por ordoni ĝian malaperon? For Biribi! Vivu ROUSSET!”

Oni petos la liberigon de ROUSSET, tiu kuraĝulo, kiu denunciis la asasinistojn. Sed la registaro ne estas preta tion fari. Jam li malpermesigis la eltombigon de la korpo de AERNOULT, kiu devis esti transportata Parizon, kie granda manifestacio devis okazi la 3an de Julio. Sed la registaro ne perdos por atendi. La eltombigo fariĝos en Oktobro kaj la granda manifestacio okazos. Plie grandnombraj mitingoj okazos ĝis la malapero de „Biribi” kaj por eviti ke oni silentu pri tiu afero, la gepatroj de AERNOULT kaj la frato de ROUSSET deponis plendon ĉe la juĝejo kontraŭ la mortigistoj.

Estus necese ke granda movado okazu simila al tiu de la fama Dreyfusa afero kaj ke ĝi ĉesu nur kiam la registaro estos obeinta al la publika opinio.

* * *

La fervojistoj ĉiam agitadas kaj la 17an de Julio la administrada konsilantaro voĉdonis la ĝeneralan strikon. La strika komitato havas povon ĉesigi la laboron kiam ĝi juĝos tion necesa. Ni esperu ke la fervojistoj sukcesos venki la potencajn kompaniojn, kiuj jam agis por disigi la strikantojn, por se eble malsukcesigi la strikon. Efektive ili donis kontentigon al parto de la fervojistoj esperante ke tiuj lastaj ne strikos. Sed se la mekanikistoj strikos, la fervojistoj tre certe venkos malgraŭ ĉio. La revoluciistoj kaj la „Ĝenerala Konfederacio de la Laboro” estas pretaj helpi ilin.

LUDOVIKO.

El Germanujo.

Je la 22, 23 kaj 25 de Junio staris antaŭ la landjuĝistaro en Munĥeno (Bavarujo) fortepianisto SCHULZE (Morax), verkisto MÜHSAM, laboristo ERTL, vojaĝisto de librovendejo KINDLER kaj hemigrafisto WITTICH.

La gazetaro jam kelkajn tagojn antaŭe anoncis tiun „proceson je anarkiistoj”.

1) La mortintejo estas en la ĉirkaŭaĵoj.

Oni juĝis ĉi tiujn kvin virojn pro organizado de sekreta unuiĝo, kies celo konsistis en la plej diversaj kulpoj kontraŭ la leĝoj; oni certigis ke la kulpigatoj ne nur agitis en la fondita unuiĝo kontraŭ ŝtato, eklezio, polico kaj militistaro, sed ili projektis ankaŭ plenumi ŝtelajojn kaj kontrabandon, fabriki falsmonerojn kaj bombojn, okazigi bombatencojn kontraŭ diversaj personoj kaj detrui per dinamito diversajn konstruaĵojn. Krom tio SCHULZE, ERTL kaj WITTICH estis kulpigataj pro forigi la elpendaĵojn de la hispana konsulejo (kulpo farita kelkajn tagojn post la mortigo al FRANCISKO FERRER).

Tia la kulpigo. Kia estas la rezultato? El ĉiuj kulpigatoj estas kondamnitaj: ERTL pro forigi la konsulependaĵojn al du monatoj kaj SCHULZE pro tiu sama kulpo kaj pro uzi falsan nomon al kvin monatoj de malliberepuno. Kaj tiu puno ne estos plenumita, ĉar ambaŭ kondamnitaj jam suferis dum multaj monatoj la esplorareston.

Efektive oni povus diri — multe da bruo pro nenio! Sed tio ne estas por ĉi tiu fojo kulpo de juĝistaro: la tuta afero estas, ke kelkaj el kulpigatoj esperis trovi inter la prostitulinoj kaj vizitantoj de „Soller” (drinkejo de la plej malbonega speco) „agdeziremajn” personojn (laŭ MÜHSAM), kiujn ili volis eltiri alen kaj eĉ gajni por anarkiismo. Por tiu celo oni kunvenis en apartaj ĉambroj de diversaj malgrandaj restoracioj kaj al la „gastoj” oni proponis senpagbieron. Ĉi tiu logaĵo okazis tre efikebla. En la gastoj ne estis manko. Sed estas alia demando, kion krom tio atingis la organizanta?

El la proceso ni scias nur sekvan: 1. unu „gasto” partopreninta al tiuj kunvenoj ŝtelis ion ĉe alia; 2. en unu el restoracioj oni ŝtelis ian kvanton da cigaredoj kaj la mastro rifuzis pro tio doni en estonteco sian ejon por kunvenoj; 3. unu atestanto konfesis dum la proceso, ke kulpigante MÜHSAM, SCHULZE kaj aliajn li „terure mensogis” al la polickomisario kaj al la esploriganto: oni efektive parolis pri ŝtelado, kontrabando, fabrikado de falsmoneroj k.t.p., sed oni ne projektis plenumi tion serioze. Suferrante dekonnotan malliberepunon pro iu ŝtelajo farita ankoraŭ pli frue antaŭ nomitaj kunvenoj, li esperis, ke kiel atestanto en la proceso je anarkiistoj li pasigos kelkajn tagojn ekster malliberejo kaj ricevos pli bonan nutraĵon; 4. Aliaj atestantoj konfesis, ke estante ĉiun fojon dum la kunvenoj ebriegaj per alkoholo ili nenion komprenis el la paroloj de la anarkiistoj; 5. oni atestis, ke en la kunvenoj oni parolis ankaŭ pri la libera amo kaj homo-seksualeco.

Nun laŭ opinio de la juĝistaro ne estas pruvitaj ke la kulpigatoj organizis sekretan unuiĝon, ĉar tiuj kunvenoj estis sen estro kaj anoj, ankaŭ sen kotizantaj, vizitantoj; ke ne estas ankaŭ pruvita, ke oni efektive „projektis” iun ajn kulpon. Kaj la juĝistaro estante konvinkita, ke sinjoroj anarkiistoj organizintaj tiujn kunvenojn jam punis sin mem sufiĉe (la juĝprezidanto esprimis tiun opinion) malkondamnis ilin ĉiujn je ĉi tiuj punktoj kaj kondamnis nur, kiel mi jam nomis, du personojn pri la forigo de konsulependaĵo.

Mi opinias, ke tiu ĉi proceso estas atentinda por la

ruĝuloj de ĉiuj landoj, ĉar per ĝi unu iojon plu ni ĉiuj estas admonataj kiel eble plej serioze elekti la rimedojn por bataladi kontraŭ la ŝtato. Certe de tempo al tempo oni povas trovi homojn bravajn, kapablajn, inteligentajn ankaŭ inter la reprezentantaj „kvinan staton”, malfeliĉaj duoninfanoj de la „sorto” (socio!) puŝitaj en la ŝlimegon, el kiu tro malofte eliras iu ajn. Mi ne volas nei tion. Sed alvoki personojn sen elekto, allogante ilin per senpagbiero, liveri al ili eblecon fariĝi ebriegaj per alkoholo kaj je tiaj cirkonstancoj meti en la fundamenton de elparoloj kun ili la tempojn supre nomitajn — ĉu estas tiu paŝo sufiĉe pripensita? Ĉu oni povas serioze nomi tion „klarigi kaj revoluciigi la proletariaron”? Mi silentus pri tiu ĉi afero, se ne kaŭzus ĝin MŬHSAM, konata en Germanujo kiel anarkiisto kaj MARK HARDA, anarkiistino el Bern (Svisujo).

Di.

El Hungarujo.

La budapesta polico enviis la gloron de alilandaj policoj, kiun ili ĝuas sekve de persekutado de la rusaj revoluciemuloj. Decidis ĝi do, ne postresti de siaj kolegoj kaj dungis spionon el rusaj, similan AZEV. Sed la rusoj pace sin kondukis en Budapest, nenion oni povis kontraŭ ili fari. Sed la monon, ricevitan de polico oni devas iel priservi, ĉar alie ĝi maldungas la spionon. Do, por ke BRAGINSKY (nomo de spiono) ne perdu la bonan salajron, li mem alŝtelis al rusoj kelkajn broŝurojn anarkiistajn (tio ĉi estas grava „krimo” en Hungarujo, legi anarkiistajn broŝurojn, ĉar la „matura” burĝaro kaj la mallerta polico komprenas sub anarhisto ŝteliston kaj rabiston) kaj poste tuj sendis tien detektivojn kiuj traserĉante la ĉambron, trovis la nomitajn broŝurojn kaj la tie trovitajn tri personojn kondukis al policejo, nome: GRISO MARGOLYUT, ANO TROJANSKA kaj BENJAMO WEINBERG. Okaze de la aŭskultado malkovrigis friponeco de BRAGINSKY, ke li trompis la malspritaĵn, gloravidajn policistojn. La polico, por ŝirmi sian mallertecon, la du lastnomitajn devigis forlasi Hungarujon. Sed sama sorto trafis ankaŭ la spionon. La eksterlandaj samideanoj ricevu ĉiun laŭ merito!

La kolektiva kontrakto de Budapeŝta presistaro finiĝis lastan de Aprilo. La laboristoj konfidis la gvidistojn trakti kun mastroj pri nova kontrakto. Ili traktadis tri monatojn, ne sciigante la laboristojn pri traktado eĉ per unu vorto. Kaj kiam la tarifo estis preta, la plimulto de laboristoj ne trovante ĝin kontentiga, malakceptis. La nekutima okazo tre ĝenis la gvidistojn, kiuj, por timigi la laboristojn, tuj abdikis sian mision kaj ekkomencis prilabori la malkontentulojn. Ĉiuvespere oni tenis kunyenojn, kie la gvidistoj delogis la laboristojn, dirante: La mastroj volas strikon, volas fari eksigon por malpliigi la salajron, plilongigi la labortempon k.t.p. Fine oni konsentis en tio, ke la decido konfidas al internacia sekretario de presistoj. Kvazaŭ li konus la hungarlandajn rilatojn. Ĉiu estis konvinkita, ke la internacia sekretario tiel same ne volas strikon kiel la salajritaj gvidistoj. Kaj neniu logiĝis, ĉar la internacia sekretario proponis akcepti la tarifon, kion la laboristojn plenumis. Laŭ la nova tarifo ili ricevas ĉiusemajne 34

kronojn minimume (antaŭ nun 32). En 1912, 1914, 1916, la salajro altiĝos per 1—1 krono. La labortempo estas $8\frac{3}{4}$ horoj (antaŭ nun 9). En 1915 estos $8\frac{1}{2}$ horoj. La kontrakto daŭros 8 jarojn! Tiu ĉi tempo tute sufiĉas por ili perdi la ankoraŭ havatan malmultan revoluciemon.

Pro tio ke la mastroj eksigis la seruristojn, multe da loĝejoj ne estos pretaj lan de Aŭgusto, kvankam ili jam ĉiuj estas ludonitaj. Nun la luprenantoj ne povas enloĝiĝi kaj en la malnovaj loĝejoj ankaŭ ne povas plu resti, ĉar ankaŭ ili estas ludonitaj al aliaj. Pro tio ĉi granda estas malkvieteco en Budapest. La mastroj volis ŝovi la respondecon al laboristoj dirante, ke ili estas la kaŭzo de ĉio, ĉar ĉiam postulas neplenumablajn kondiĉojn. Tiam la seruristoj por senmaskigi la mastrojn, abdikis siajn postulojn kaj sciigis al mastroj kaj al urbestro, ke ili inklinas pretfari domojn de urbo por malnovaj kondiĉoj. Sed la mastroj rifuzis la rekomendon dirante ke ili postulas plenan subigon, ĉar alie eksigos la tutan konstruistan laboristaron! Do, ne la laboristoj estas la kulpaj ke la loĝejoj ne estos pretaj je preciza tempo, sed la mastroj, kiuj preskaŭ ĉiuj havas domegon, eĉ iuj dek! Kaj ili tute ne volas, ke la luprezoj iom malaltiĝu, kaj tio ĉi estas la vera motivo kial ili eksigis siajn laboristojn, kiuj ne lasis sin plene senhautigi.

Plipezigas la situacion, ke la maŝinistikoj decidis eksigi la tutajn ferajistojn (25.000), ĉar en iu fabrikejo 21 kuprolaboristoj ekstrikis, kaj ne volante ĝis tiam labori dum la fabrikisto ne plenumos iliajn postulojn.

Ankaŭ la loĝantoj sin preparas kontraŭ la patronoj. Je la de Aŭgusto oni intencas fari strikon, t. e. oni ne pagos luprezon al domposedantoj, ĝis kiam ili ne malpliigos ĝin.

* * *

La eksigo al ferajistoj ne okazos, ĉar la fabrikisto grandparte plenumis postulojn de kuprolaboristoj, kiuj baldaŭ komencos labori.

En iu hungarlanda vilaĝo (Alkér) ekstrikis 60 rikoltistoj. Pro tio ĉiun oni kondamnis 30 tagojn malliberigo. La domposedantoj sin organizas en Budapest por ne ludoni loĝejon al tiuj, kiuj gvidrolon ludas en la lupreza striko kaj en la bojkotado al domoj de procentegistoj.

SINCERA.

El Nov-Zelando.

Je pasinta Lundo la 28an de Marto, en la urbo de Christchurch (Krajstĉurĉ) okazis la 3a ĉiujara konferenco de la Nov-Zelanda Socialista Partio, kie 20 delegitoj, kiuj reprezentis 16 el la 27 filioj de la Partio, partoprenis.

Estis decidita fari la partian journalon „The Commonwealth” (Komuna-bono) (en la nuna tempo nur monatan) semajnan journalon.

Estis decidita akiri £ 1000 (cirkaŭ 10.000 Sm.) por aĉeti socialistan presilaron, kaj por tion fari estis decidita eldoni 2000 akciojn (angla vorto, debentures) valore ĉiu 10 Sh. (5 Sm.) ne portante procenton kaj repagebla kiam kaj kiel la nacia direktoraro decidus.

Elspezoj de la tuta Partio dum la lastaj 12 monatoj

estis £ 2000, ĉirkaŭ 20.000 Sm., la plej granda parto acetante literaturon.

Estis ankaŭ decidita aliĝi al la Internacia Socialista Oficejo en Stuttgart.

En la Aprila numero de la „Commonweal” estis enpresitaj la regularo kaj la unua ĉiujara raporto de la Brita Esperanta Socialista Ligo.

La unua tago de Majo ne estas jam festita de socialistoj en tiu ĉi lando, esceptinta ke ĝi okazos je Dimanĉo. N. Z. labor-tago estas festata je la dua merkredo en Oktobro en ĉiu jaro.

C. H. PARKER.

El Rumanujo.

Inter la 5a kaj 10a de Septembro okazis en Jassy'o kongreso de studentoj sub la kaŝata patroneco de la universitataj profesoroj IORGA kaj KUZA. Oni diris ke tiu kongreso malfermos novan idearon, estos nova intelekta manifestacio. Efektive la studentaro estis ekcitiĝinta per kruela malamo kontraŭ la fremduloj, precipe kontraŭ la malriĉaj Israelidoj. Ĉiuj reformoj defendataj de la naciistaj studentoj portas la saman econ. Por ni kiuj konas la sentojn de la plimulto, ĉio malkaŝis la instigon de la kontraŭsemidaj estroj IORGA kaj CUZA.

Tiel granda okazintaĵo estis la kongreso por la antaŭen puŝo de la sciencoj en Rumanujo kiu okazis ĉe la fino de Septembro de 1909a. La kongreso okupiĝis precipe pri la aplikado de la sciencoj al la industrio kaj al la terkulturo. Tio estis tute natura. La anoj de la asocio estas scienculoj *oficialaj*, riĉuloj kaj ilia tuta scienca priokupo estas direktata laŭ la senco de la fruktigo de iliaj bienoj kaj de la regado de la popolo.

Malgraŭ ke por la okazintaĵoj de nia lando, niaj kleruloj estas malprogresemaj kaj sektemaj, por la eksteraj okazintaĵoj ili estas kelkafoje pli homamaj. Tio okazis pri la mortigo de l' anarhisto FRANCISCO FERRER per la interligita reakcio de la hispanaj klerikalismo kaj militarismo. Forta emocio ekscitis la animojn de ĉiuj kleruloj. Publika kunveno estis kunvokata por la vespero de la sabato 3a Oktobro en la ĉambrego de la *rondo Romania Muncitoare* (La Rumanujo laborista) de Bukaresto. Paroladis tie J. C. FRIMU, N. D. COCEA, O. CALIN, AL. CONSTANTINESCU, L. D. MARINESKO ĉiuj socialdemokratoj konitaj en aliaj cirkonstancoj kiel malamikoj plej obstinaj de la libera penso.

Ni pasu al alia grava okazintaĵo kiu dum kelka tempo emociis la popolon, parolu ni de la elpelo de la Dro RACOWSKI. Jen ĝia deveno: post la eniro de la estroj de la socialdemokratio rumana en la partion de la libera burĝaro, la sola kiu restis iom fidela al la principoj, estis tiu Sro RACOWSKI; jen estas la motivoj de la kontraŭstaro de RACOWSKI; li scias bone ke la profitoj en la libera Partio estus multe malpli grandaj ol la aŭreolo kiun li havas hodiaŭ kiel estro de partio socialdemokrata. Li estis konscia ke li ne povis fariĝi estro de la libera partio, nek ĉefministro, li kontentigas resti tia kia li estas, ĉar li ne bezonas gajni monon tial ke li havas sufiĉe da ĝi, ĉar li konas la popolan psikologion, kaj scias kiel akiri ĝian simpatian, RACOWSKI estas la vera tipo de la politikisto.

La konservativa registaro akorde kun la libera partio laboris por liberigi sin de li. Sed por klarigi, kiamaniere ni devas iri malantaŭen.

La malsatuloj por aŭtoritato, la liberaj ĉarlatanoj, apogante sin sur la nescio kaj mizero de la vilaĝanoj, donante al si la ŝajnon de modernaj homoj, laborante por altiri al ili, kiun ajn estis renkontata sur ilia vojo por konkurenci kun ili, utiligis en 1907 la ribelon de la terproletariaro kontraŭ la terposedantoj kaj terluantoj, ribelo, kiun ili estis instiginta kaj kiun ili pacigis per la kanono kaj la pafilo, detruanta multajn vilaĝojn kaj mortigante 11000 rumanajn kamparanojn.

La liberaluloj kiam ili estas ĉe la direktilo uzas alian taktikon; utiligante la spionadon, la turmentadon, la malliberigon, fine ĉiujn rimedojn kiujn la potenculoj scias uzi kiam ili havas en manoj la regadpovon. Por montri al la komercisto — Reĝo KARLO ke ili ne estas socialistoj, ili estas kruelege brutaj ĉe la haltigo de la ribeloj, ili turmentegis en la antaŭjuĝa malliberejo BASILO COGALCEANON kaj VALESCO. Kaj tio ne sufiĉis al ili. Ili forpelis pli ol 800 homojn en la plimulto hebreojn, plie Rumanojn el Transylvanio, kaj aliajn apartenantajn al diversaj nacioj, forpeltitaj kiel instigantoj de la ribelo kamparana de 1907a.

Ili imagis kulpigi RACOWSKI pro esti unu el la instigantoj de tiu ĉi ribelo, sen persekuti lin tamen; plie pro esti fremdulo, bulgara regnano, kiam li estis oficiro kuracisto en unu rumana regimento de kavalerio kaj ankaŭ registara konsilisto.

Apoginte sin sur tiu ĉi malvera kulpigo, oni profitis la cirkonstancan ke li iris al la kongreso socialdemokrata de Stuttgart'o por malpermesi al li la reeniron en sian landon.

La kasacia juĝantaro kiel ĉiuj klasaj juĝantaroj konfirmis la elpelon kiel laŭleĝan!! Tiu fakto estis sekvata de polemiko de la ĵurnalo socialdemokrata *Romania Muncitoare* (La laborema Rumanujo) kaj de la ĵurnalo *Adevarul* (La Vero) por la revizio de la proceso; kaj tiu ĉi cele oni faris serion da publikaj kunvenoj sen kontentigan rezultaton. Estas senutile paroli pri ĉiuj tiuj ĉi kunvenoj, rememoru ni nur la lastajn; Dimanĉon 18an Oktobron 1909an *Romania Muncitoare* de Jassy'o estis organizinta publikan kunvenon en la ĉambrego Pastia'o; sur la demando pri RACOWSKI en kiu la profesoro universitata P. BUJOR devis paroli pri la mortigo al FRANCISCO FERRER. Tiu ĉi kunveno estis dispelita de la kontraŭsemiduloj de CUZA. Londono vespere 19an Oktobron la rondo *Romania Muncitoare* de Bukaresto faris samcele publikan kunvenon, sed sen diri eĉ unu vorton pri la aliaj 800 elpeltitoj. Post la kunveno la gardohundoj de la reganta burĝaro, la policaro kaj la militistaro, malebligis la manifestacion, kiu devis okazi, ekversante multe da sango sur la Bukarestaj stratoj. Oni arestis kelkajn homojn, el kiuj ok estis enfermataj en la malliberejo VACARECHLI kaj kondamnitaj je ok tagoj.

La partia gazetaro, la politikaj homoj pardonus al RACOWSKI esti socialdemokrato sed RACOWSKI estas anarkisto ili diras.

Junaj socialistoj publikigis en *Romania Muncitoare* tradukajojn de francaj revoluciaj artikoloj, en kiuj oni

parolis pri rekta agado, sabotado k. t. p., *ne kompreneble* uzotaj por nia lando, sed por sciigo de kelkaj ideodirektoj en Francujo. Kaj tiam RACOWSKI timante ke la laboristoj lasu sin ekkapti de francaj ideoj, intermetis sin kun energio plej granda kaj malaperigis el la ĵurnaloj tiujn ĉi tradukajojn renversemajn. Sekve RACOWSKI la supozita anarkiisto, atentis de malproksime por ke la movado laborista ne ekglitu sur anarkiema deklivo kaj ke ĝi restu ĉiam socialdemokrata.

La kongreso socialdemokrata kiu okazis en Bukaresto la 31an de Januaro kaj la 1an kaj 2an de Februaro 1910 klarigas pli bone, mi kredas, la karakteron, la priokupojn ĉefajn kaj la intencojn de la rumana socialdemokratio. En unu proksima korespondajo mi parolos sur la kongreso socialdemokrata kaj aliaj gravaj demandoj.

M. J. DEMETRIO.

El Ruslando.

Kiel oni zorgas pri riĉeco kaj rajto de la rusaj vilaĝanoj.

En vilaĝo Bolotovo, Tombova gubernio, apud Moskvo, dum pasinta Majo nuna jaro al 60 dommastroj (el ĝenerala nombro 480 loĝantoj, t. e. unu okono) estis permesita de l'nepa membro de distrikta teraranĝanta komitato R. rajton por eldividi el vilaĝana komuno¹⁾ kaj al ili devos esti donitaj plej bonaj kampoj por tio, ke ili deziris havi kampojn apud siaj domoj. Ceteraj vilaĝanoj ne permesis al ili ĉi tion fari. Tiam ili plendis al estroj, kaj post tio alveturis en vilaĝo nepa membro R. kaj landajestro E. kaj komencis dividi la kampojn. La vilaĝanoj petis ilin atendi ĝis aŭtuno, kiam ili rikoltos la sekalon, kiu kreskis sur tiuj ĉi kampoj. Sed „diligenta estraro“ ne atentis al peto de l'vilaĝanoj kaj daŭrigis sian malbonan aferon. Tiam la vilaĝanoj, vidante ke iliaj petoj ne estis estimataj kaj la sekalo estas ĉifita, ili barigis la kampojn per siaj edzinoj kaj infanoj. La alveturinta distriktestro ordonis al siaj militgardistoj dispeli la amason per nahajkoj (rimena vipo). Antaŭ vilaĝanoj eliris la pastro kun la kruco kaj evangelio kaj petis la distriktestron ne fari la perforton kaj promesis al li, ke li almonus la vilaĝanojn cedi. Sed la senkora distriktestro ne konsentis kun pastro, sed ree ordonis al militgardistoj dispeli la vilaĝanojn per nahajkoj. Komencis terura pogromo kaj piedbatalado de ĉevaloj virinojn kaj infanojn. El malantaŭaj vicoj de l'vilaĝanoj estis jetitaj kelkajn stonojn. La distriktestro ordonis al siaj sovaĝaj helpantoj deiri de ĉevaloj kaj pafigi. Post pafado restis sur loko: 6 homoj mortigitaj kaj 15 homoj vunditaj, el kiuj baldaŭe 3 homoj mortis. La plej granda parto estis malfacile vundita“.

Laŭ A. STAĤOVIĉ.

Tradukis J. K.

* * *

Al ĉiuj estas konataj senleĝeco kaj senrajteco, regantaj en Ruslando, kaj senhelpeco de loĝantaro antaŭ ĉiuspecaj fipolicistoj. Sed ĉi tiu senrajteco fortege sen-

tiĝas en regionoj kaj lokoj provincaj, sin trovantaj longe de centro de ĉefregado. Tie arbitracio de fipolicistaro estas senlimigita.

En mia naskurbo (Kamensk, Dona regiono) kie precipe loĝadas „kozakoj“, mi estas rimarkiginta tiajn fakto.n.

Ĉiu iranto (unufoje-mi) noktatempe estas detenata per „patrul“ (nokta ĉevala gardo) por „elsciigado de persono“ kaj ofte nur mona depago permesas al iranto daŭrigi sian iradon pli-malpli libere....

Ho malfeliĉa grandega Ruslando!

Ho malfeliĉega ruslanda popolo!

10 Julio.

ENSO.

El Svedlando.

La Societo por la humana infannaskiĝo eldonis pamfleton jenan:

„Kaŭzite je la leĝopropono kontraŭ la metodoj por limigi la infannaskiĝon, la laborista klaso admoniĝas al

DEFENDRIFUZO DE LA VIRINOJ!

Kamaradinoj!

La viraj laboristoj jam protestis kontraŭ ke ili deviĝis per armilpotenco defendi la malpravan klassocion.

Ni virinoj, rifuzu naski al la socio sklavinon, kiu nur grandigas la mizeron en niaj artikoj. La ekzisto de la socio dependas je la senlima riceveblo da malriĉuloj. Ni malpligandigu ĉi tiun riceveblon kaj faru *patrinan strikon*. La pli antaŭa ŝirmo al socio estas la patrinoj kaj fruktoporto estas granda kaj grava eco. Ni ŝparu nian fruktodonon ĝis tiu povos esti por ni benanta. En nuna tempo ĝi nur estas utila por la nuna socio, kies ekonomia supero estas la grandegindustrio. Kiu volus, dum milito en sieĝa urbo, grandigi la nombron de malsatantoj per nasko da infanoj, tiam ja eblon elteni dum la malsatmilito malpligrandigi. Certe, tiu el ni, kiu ne en tia situacio povus sin gardi por patrineco, estus komune kondamnito. La proletarioj nun estas enfermitaj en mondo da fabrikoj tiel dum sieĝo kaj mizero naskas mizeron. Honoru al tiu virino kiu estas konscia pri sia respondeco kaj agas laŭ tio.

Oni opinias ke nia defenddevo estas patrineco, sed se ni daŭras sen kontraŭe kiel ĝis nun fari tian devon, nia tuta klaso estas ligita ĉe la maŝinoj nevideblan tempon antaŭen. Tial ni per metodoj, kiujn la kuracscienco donas al ni, aŭ se la obskuranta registaro deŝiras nin de tiuj metodoj, per metodoj, kiujn la naturo mem metas al nia dispono, estos sciantaj limigi la fruktoporton. Antaŭ ol niaj okuloj estos malfermitaj por ke ni ne povas venki nur per la amaso sed antaŭe per nia batalpotenco, la tago por la revolucio ne estos venanta.

Nia batalrimedo estas la striko.

Kion ni povus elteni en tiu batalo kiam la hejmo estos plena da malsatantaj maigranduloj?

Patrinoj, rifuzu al la burĝa socio vian fruktodonecon, rifuzu al la nejusta socio vian grandan ŝirmon!“

La nova leĝo kontraŭ N.-M. movado nun estas akcep-

1) Laŭ la leĝo de 9a Novembro 1906 jaro oni povas eliri el vilaĝana komuno kaj tion ĉi oni kutime faradas aŭtune, kiam la kampoj estas malplenaj. TRADUKISTO.

tita en la parlamento — la nova Dio por la plumulto de la laboristoj. Ĝi malpermesas *publikan ekspozicion* aŭ *montradon* de objektoj por nemorala uzado aŭ por nenigi la sekvojn de seksorilatoj. Disvastigon de skribaĵoj aŭ per alia maniero al la publiko sciigo pri vendo. Ĉirkaŭkondukon por vendo de tiaj objektoj, meme aŭ per alia homo; aŭ dum tiaj okazoj ke la publika sendanĝero aŭ aliaj estos delogitaj de tio. Parole aŭ skribe pruvi delogi uzadon de nomitaj objektoj aŭ donante sciigojn pri la uzado.

Kiel vi vidas la leĝo estas en sia formo kaj enhavo antikva kaj malnobla, sed ĝi helpu nin malfermi la okulojn de la dormantoj.

* * *

25—27 Junio estis kongreso en Stockholmo por fondi novajn fackföreningen (sindikatoj). Multe da laboristoj estas malkontentaj al la maljuna organizo kaj la senenergia taktiko. Ĉe la kongreso partoprenis delegitoj de 30 fakf., 6 de junsocialistaj kluboj kaj 21 privataj personoj. Post tre interesa debato decidigis fondi „la Sveda Laborista Centra Organizo, fondita de fakaj unuiĝoj”. La celo estas revolucie batali kapitalistojn. La socialdemokratoj ĝin nomas la sindikatismo kaj ĝi estas simila al la franca movado (C. G. T.) sed ili ĉiam uzas la vorto sindikatismo kiel mokvorto.

* * *

Por la pacokongreso tie ĉi, la 1—7 Augusto, estas kunmetita „honorkomitato” por ŝirmi ĝin. En tio oni rimarku: LINDMAN, ŝtatministro en tre konservativa kaj militema „registaro”, K. LTAAF, eksministro. Dum lia ministra tempo li proponis novajn, kruelajn leĝojn kontraŭ la kontraŭmilita propagando. Ĉi tiuj leĝoj estis akceptitaj de l'parlamento. L. LJUNGLUND, redaktoro de tre militema gazeto. Jes, preskaŭ la tuta komitato, ĉirkaŭ 80 personoj, estas nur pacohipokrituloj.

Oni komencas la kongreson kun preĝoj en kelkaj preĝejoj. Ili petos la tre kruelan kaj militeman kristanan dion helpi ilin en ilia paco-laboro. Ankaŭ la „pacanoj” vizitos la pli altan militan estron, la reĝon.

Ĉarlatanaĉo!

N. S. WESSEL.

Esperanta Movado.

Unua Tutruslanda Esperantista Kongreso.

Antaŭ ol diri iom pri kongreso mem, mi mallonge priskribos urbon Peterburg en kiu estis kongreso.

Peterburgo estis fondita en 1703a jaro per imperiestro PETRO la sur malgranda insuleto. Nun Peterburg estas ĉefurbo de Rusujo kaj restadejo de imperiestroj. La ĉefa ĝia parto estas sur maldekstra bordo de rivero „Neva”, kie sin trovas imperiestra palaco, regna „duma” kaj aliaj konstruaĵoj. Tie ankaŭ estas „Newskij prospekto”, la plej bela kaj longa strato de Peterburg, kiu tiriĝadas pli ol 3 verstoj (Versto estas iomete pli ol kilometro).

Sur la dekstra bordo de Neva troviĝas: borso, depaĝejo, scienca akademio, universitato kaj aliaj gravaj institutoj.

Esperanta movado en Peterburg tre pligraviĝis kaj dank'al klopodoj de tiea samideano estis ricevita permeso pri aranĝo de la Tutruslanda Esperantista Kongreso.

La kunveturon de kongresontoj estis decidita aranĝi en loĝejo de superaj virinaj kursoj. En 3a Majo en ĉi tiu loĝejo estis unua renkontiĝo kaj interkonatiĝo de kongresanoj.

En 4a Majo matene estis renkonto de nia majstro de D^{ro} L. L. ZAMENHOF ĉe Varsovia stacidomo. Ĉi tie majstron salutis reprezentantoj de diversaj institucioj: prezidanto de Tutruslanda Ligo Esperantista, per kiu estis alportita al majstro ora signo de Ligo kaj delegitoj de diversaj esperantaj grupoj. En tiu sama tago vespere estis solena kunsido en salono de Urba Domo. Oni ĉeestis ĉirkaŭ 600—700 gepersonojn alkaikulante ne-esperantistojn. Alveno ĉi tien de nia majstro estis renkontita per longa aplaŭdado. Majstro faris parolon esperantan en kiu li inter alie diris, ke ĉi tiu kongreso estas nur prepara paŝo por estontaj tutruslandaj kongresoj kaj disvastiĝado de Esperantismo en Ruslando. La kongreso priokupadis multajn demandojn kaj elportigis rezoluciojn, koncernantajn instruadon de Esperanto, propagadon de Esperanto, organizacion de tutruslandaj esperantistaj kongresoj ĉiujare, enkondukon de Esperanto en la praktikan vivon, internacian esperantistan kongreson en Ruslando, kaj aliaj. Instruado de Esperanto devas esti unuformita laŭ „Fundamento de Esperanto” kaj devas esti aranĝataj ekzamenoj kaj disdonado de trigradaj atestoj. Tiaj kaj similaj proponoj estis akceptataj unuvoĉe aŭ per plejmulto da voĉoj, sed aparta disputado prenis demando pri internacia esperantista kongreso en Ruslando. Kelkaj personoj estis proponintaj aranĝi ĝin en Varsovio, kiel en loko de la naskiĝo de nia kara lingvo, sed majstro mem kontraŭiĝis al tio, dirante, ke tio ne estas deziro de pola popolo kaj tial kun li devas konsenti ilin. La demando pri internacia esperantista kongreso en Ruslando ne ankoraŭ estas decidita nun.

La 2a tutruslanda kongreso estos en Moskvo.

N. SKVORCOV.

* * *

La grupo esperantista „Libero” el Barcelono, deziras korespondadon kun ĉiaj liberemaj grupoj de ĉiuj landoj per Esperanto pri socialaj aferoj.

Samtempe ni fervore petas de la grupojn aŭ asociojn kiuj publikigas socialajn broŝurojn por propagandi ideojn sendi ekzempleron por ĝia disvastigo kaj propagando en nia lando. Do ni kredas ke farante tion estas la plej bona rimedo por diskonigi novajn ideojn kaj pensojn inter la homoj kiuj sin priokupas de vera kaj libera agado.

Adreso: Grupo Esperantista „Libero”, strato Merced 19, pral., Barcelono, Hispanlando.

Alvoko kaj Peto.

La subskribinto estas verkanta esperantan lernolibron speciale por laboristoj. Intencante aldoni al la enhavo malgrandajn interparoladojn pri ia ajn temo el la ĉiu-

taga vivo de l' laboristo li petas la kolegojn verki por li proksimume 20 linian interparoladon. Inter du, tri aŭ kvar viroj aŭ virinoj pri ia ajn temo; la laboro, manĝante, promenadante, dum ludoj, dum ia kunveno, k.t.p. La interparoladoj servos kiel lego-ekzercadoj kaj ilia deveno estos nomita en la libro. Ĉio estos akceptata plezurege kaj kun bonkorega danko de

OSCAR ZIMMERMAN.

Instruisto de la Socialdemokrata Laborista Grupo en Frankfurt a/M.
25 Merianstrasse.

Novajĉiulandaj.

EGIPTO. La 20an de Februaro junulo dudekjara, WARDANI, pafis per revolvero kvarfoje al ĉefministro BOUTROS PASHA, kiu mortis la sekvantan tagon post esti operaciita. Tuj arestita la atencinto deklaris esti aginta pro politikaj kaŭzoj. Kondamnita je morto, li estis pendigata la 30an de Junio, interne de malliberejo, kie nur oficistoj ĉeestis ĉar oni timis demonstraĵojn el la popolamaso, favorajn al la kondamnito. Estas la unua politika atenco okazinta en Egipto.

J. B.

Novaj Revuoj.

Gestudentaj interesoj tuthomaraĵ, ofic. org. d. l. Un. Idea Soc. de progr. stud. Adreso: Esperanto, Luhačovice, Moravio. Numerprezo 10 Sd.

Discussiones, organo de la „Academia pro interlingua”. Adreso: Prof. G. PEANO, Cavoretto, Torino (Italio) Numerprezo 1 franko.

Mundus, semajna revuo poliglota, en franca, angla, itala, germana, hispana kaj Esperanta. Adreso: Via Nazionale 152, Roma. Abonprezo 12,50 frankoj (U. S. A. 20 frankoj).

Bonvenon al la novaj kunfratoj!

Leterkesto.

Ni sciigas nian legantaron ke ni havas ankoraŭ *nur kelkajn* plenajn kolektojn de nia revuo je la sekvantaj prezoj:

La 1a jaro kostas 7 frankojn.

„ 2a „ „ 6 „
„ 3a „ „ 3,50 „ afrankite.

Sin turni al nia franca administracio, 49 Rue de Bretagne en Paris.

Ni afable petas la kunlaborantojn, ke ili skribu klare, nur sur unu flanko de l' papero, kaj, uzante neordinarajn vortojn, klarigi ilin per specialaj notoj.

Ni ankaŭ petas la opinion de l' legantaro pri ŝanĝo de l' nomo: *Socia Movado*, ĉar tiu nomo ne plu ŝajnas al ni taŭga por ĝia enhavo.

Ni tre dezirus, ke ankaŭ el Nederlando irus Esperantisto al Kopenhaga Kongreso, por labori por Esperanto. Nian kunlaboranton NUTTERS ni proponas por tio: li estas fervora propagandisto. Al ĉiuj simpatiantoj ni petas *tujan* monhelpon, kiun ni specifos en nova numero de nia revuo.

Kopio havata: I. Poemoj: Himno al la Paco (F. G. L. M.); La homoj, kiuj laboras (A. G. SPARROW); Letero (EMIL GYAGYOVSKY); II. Artikoloj: Tiel parolu el infanoj (B. LAJAN-KY); Aktorina mizero (W. NUTTERS); Kapitalismo kaj homa karaktero (W. NUTTERS); Famplena historio de reĝolando Nederlando en 19a kaj 20a jarcento (W. NUTTERS); L' atenco kontraŭ la rajto de l' gepatroj (D. J.); Mi ne povas pluen silenti (L. N. TOLSTOJ); Rusaj martiroj (du impresantaj leteroj); Sonĝo (ANDREA COSTA); Difino de Vegetarismo (I. U. E. V.); Burĝa familio (M. TAJĈ); Lernejo kaj militarismo (ELISABETH BÜNEMANN); La lasta tago de kondamnito (H. VAN ETTEN); La ciferoj parolu (MORAVIANO); Parolo inter filo kaj patro (L. TOLSTOJ); Ludwig Kulczycki (A. BAĈUVKA); Sociaj tendencoj el anarkiista vidpunkto (KALANDRO); Katharina Breshkovskaja (D. J.); Rusa agrara revolucio (BORISO); La labormarĉandado kaj ĝiaj ŝanceliĝoj (GUSTAV SCHWENGELER); Internacia Ordeno por Etiko kaj Kulturo (Dro FR. UHLMANN); „Scouting for boys”, la atendinda sistemo eduki patriotojn (D. J.); Nia internacia enketo: Nederlando II (R. COOMANS); Partopreno de laboristoj en la gajno (W. NUTTERS); La bonfarto de Holando (W. NUTTERS); Bibliografio.

I. S. R.

Niaj Kalkuloj.

En kaso la 28an de Julio	166.90 guldenoj
Ni ricevis:	
En Paris:	
Habert 4; Mitteilungen 6.90; Lézy 2; Renaudin 2; Galois 2; Michael 2; Stirling 3.50; vendo ponumere 2.70; kune 25.10 frankoj, estas	11.93 „
En Hago:	
Kakatschef 1.65; Buhlemann 7.60; Kabonov 5; Schwengeler 1.61; Jwanskij 3.15; Bikar 1.40; Almond 1; Nurminen 1.40; Heidweiller 1.75; Matuszewski 0.50; Nutters 3.70; kune	28.76 „
Entute	207.59 guldenoj
ELSPEZOJ:	
Afrankajoj k.c. en Paris 12 frankoj, estas 5.70. Prezo de la 8a, sendo, Korespondo k.c. 35.09; kune	40.79 guldenoj
Enspezoj 207.59 guldenoj	
Elspezoj 40.79 „	
En kaso 166.80 guldenoj (137.85 Sm.)	

Ni volonte kontinuos eldoni 12-paĝan numeron, SE oni sendos sufiĉan helpmonon.